

Adelboden kaj la malgrandaj esperantaj renkontiĝoj

Claude Gacond, 281-a radioprelego, 1969.02.26 & 03.01

Parolas Claude Gacond.

Baldaŭ finiĝos la vintro. Eble en via loĝloko la unuaj printempaj floroj anstataŭas la neĝon. Estas do la lasta momento por povi raporti pri la skiferio okazinta en Adelboden. Bedaŭrinde vi ne aŭdos la voĉon de mia kunlaborema edzino, kiu estas malsana.

Ĝenerale ni ne raportis pri tiu manifestacio, pro tio, ke ni estas ĝiaj organizantoj. Tiun ĉi jaron ni faros escepton, kaj ni provos diri kelkajn vortojn pri tiu renkontiĝo de esperantistaj skiemuloj.

Por la dekdua fojo ni havis la privilegion kaj samtempe la zorgoplenan funkcion organizi tiun restadon. Ni diras privilegion, ĉar tiu manifestacio ĉiam alportis al ni multajn ĝojojn.

Tiuj ĝojoj estas tre diversaj. Ni revidas gepartoprenintojn. Ni renkontiĝas kun novuloj. Estante malgranda grupo, ni havas la okazon sufiĉe intime konatiĝi. Ni malkovras talentojn. Amikecoj formiĝas inter ni kun veraj samideanoj. Kaj ni havas la ĝojon malkovrigi al ĉiuj unu belan alpan regionon kaj al neskiantoj la plezuron de la skiado.

Nature similajn ĝojojn ni tutcerte povus trovi en iu ajn sporta aranĝo. Sed kion ni ne retrovus, tio estas la esperanta noto, tiu spicaĵo, kiu valorigas kaj unikigas tiun manifestacion.

En Adelboden, dum la sama kristnaska kaj novjara periodo, alvenas miloj da turistoj, kaj dekoj da skirestadoj grupigas internaciajn rondojn. Viciĝante ĉe la stacioj de la ski-liftoj, ni rimarkas tiujn grupojn, el kiuj radias ĝojo kaj entuziasmo. Sed samtempe tiu alfrontado kun aliaj similaj internaciaj rondoj pravas nian unikecon. Dum ili formas veran mozaikon de miskiĝantaj ĵargonoj, ĉirkaŭ nia lingvo ni formas veran komunecon. La diferenco estas okulfrapa, tiom okulfrapa eĉ, ke por la eksteruloj ni tute ne donas la impreson aparteni al pluraj nacioj.

Tiun ĉi vintron loĝis en la ĉaledo Egghaus anoj el kvin nacioj : Svislando, Francio, Italio, Nederlando kaj Danlando. Dank'al niaj kvin diversaj lingvoj : franca, germana, itala, nederlanda kaj dana ni devis uzi esperanton, kaj plian fojon ĝuis pri ĝiaj kvalitoj. Kvalitoj ne nur lingvaj, sed ankaŭ amikec-vekaj.

Sed, kiel ni diris, ne nur estas ĝojoj, sed ankaŭ zorgoj, por la organizantoj de similaj restadoj. Unue oni devas pretigi la aranĝon, nenion forgesi : la sendo de la invitiloj kaj informoj, la mendoj por la kuirado, la ordigo de la domo, la respondo al la aliĝantoj, la rifuzo de la troaj aliĝemuloj, la ricevo de la alvenantoj, la organizo de la tagprogramo, la disdono de la mastrumadaj funkcioj, la gvido de la skikursoj, la evito de akcidentoj, de malsanoj, kvereletoj.

Jen sufiĉe da zorgoj, por ĉiujare nin instigi debati, ĉu ni kuraĝos inviti plian fojon novan grupon. Sed la ricevo de informpetoj por scii, ĉu denove la skiferio okazos, la salutoj de la amikoj renkontitaj en Adelboden, kaj la rememoro pri la ĝojoj adelbodenaj ĉiam venkis ĉiujn hezitemojn.

La pruvo : la skiferio en Adelboden iĝis kutimo. Kaj manki al la tasko garantii la pluvivon de tiu kutimo iĝas por ni speco de devo. Unu vintron, pro aĉeto de domo kaj transformoj en ĝi, ni rezignis aranĝi la skiferion. Kaj ĝi ne okazis. Ni sentis nian respondecon. Sed ni samtempe sentis la malfortecon de nia movado, kiu dependas de kelkaj fortoj. Kaj tiu sento, se unuflanke ĝi nin valorigas antaŭ niaj propraj okuloj, aliflanke pravas eble la vanecon de nia laboro. Kial nin dediĉi al similaj aranĝoj ? Kial doni niajn feriojn kaj krome multajn apud-profesiajn liberajn momentojn al la organizado de esperantistaj restadoj ?

Adelboden kaj la malgrandaj esperantaj renkontiĝoj

Claude Gacond, 281-a radioprelego, 1969.02.26 & 03.01

Kiam la zorgoj superas la ĝojojn, tiuj demandoj fariĝas akraj, instigaj. Kaj tute certe ili devis senlaborigi pli ol unu esperantisto. Sed kiam okaze de la kalkulo pri la perdoj kaj profitoj oni bilancas aranĝojn similajn al la skiferio, oni konstatas, ke ili ludas ege gravan rolon en la formiĝo de vera esperantista konscio.

La grandaj manifestacioj, universalaj kongresoj, amasaj kunvenoj, ludas tute certe gravan rolon en nia movado. Ili pruvas al ni, ke ni estas fortaj, multaj, dinamikaj. La etaj aranĝoj permesas ion alian. Ili similas al speco de laboratorio, kie eksperimentoj jaron post jaro ripetiĝas. En tiuj eksperimentoj la internacia lingvo ĉesas esti perilo super la lingvoj, helpa lingvo, dua lingvo. En tiuj eksperimentoj la internacia lingvo subite fariĝas dum kelkaj tagoj multe pli ol tio. Ĝi iĝas vivanta lingvo.

Ĉiujare junaj esperantistoj, kiuj foje partoprenis plurajn grandajn manifestaciojn, priskribas al ni tiun impreson. La denseco de la rilatoj kaŭzata de la kunvivado en simpla domo de dudeko da esperantistoj multobligas la necesojn uzi la lingvon. Ne nur la vortotrezoro riĉiĝas. Samtempe ĉiuj malkovras, ke lingvo ne nur estas vortoj, sed ankaŭ aludoj, vortludoj, kutimoj, kiuj vekas ridojn aŭ komprensignojn ĉe la veteranoj.

Novulo en Adelboden ĉiam miras pri la komprensignoj, kiuj unuigas la malnovajn partoprenantojn. Estas, ke la adelbodena humuro kaj ĵargono markis siajn kreintojn, kiel familia atmosfero markas siajn kaŭzantojn.

Ni pensas, ke la forto de la esperantismo troviĝas en tiuj renkontiĝoj, kiuj konvinkigas pri la vivanteco de la zamenhofa lingvo ĉiujn siajn partoprenintojn.

Povu Adelboden ankoraŭ longe ludi tiun rolon. Kaj se foje ni mem ne plu povos porti tiun ŝarĝon aranĝi tiujn restadojn, povu alia simila manifestacio plenumi la saman rolon.

Kiam ni skizas la historion de nia movado, ni listigas la ĉefajn kongresojn. Sed tion farante, ni forgesas grandan parton de la vero. Tiuj gravaj manifestacioj ne ekzistis, se ili ne kronus milojn da etaj de longe forgesitaj kunvenoj. Dum jaroj la lokaj grupoj estis la laboratorioj, kie estis forĝita la karaktero de la esperantistoj. En nia moderna epoko manifestacioj kiel tiu de Adelboden anstataŭis tute certe la rolon de la lokaj grupoj. Ili konvinkas pri la vivanteco kaj valoro de la lingvo, dum la grupoj ĝenerale faras la kontraŭon.

Pro tio la skiferio en Adelboden ŝajnas al ni tiom utila por Svislando kaj por Eŭropo. Ho, ne miloj da esperantistoj trovas en ĝi inspiron. Tamen en ĝi estas forĝataj fortoj, kiuj poste ludas videblan rolon. Tion dirante ni pensas al kelkaj partoprenintoj. Ĉu tio ne alportas rekompencan ĝojon, kiu superas ĉiujn momentajn zorgojn ?

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-